Michel Lentz,

Nia hejmlando

tradukita de Manfredo Ratislavo

Alzet' jen fluas tra herbar'
kaj tra la rokoj Zur',
odore floras vin-vitar'[4]
ĉe la Mozela kur'.[5]
Jen nia land', por kiu ni
ja donus ĉion for.
Ni portas vin, patrujo vi,
profunde en la kor'.

Sinjoro, Vi ja gvidas la
naciojn sur la Ter'.
Vi gardu nian landon tra[6]
la tempoj de sufer'!
La liberemon frue jam
al ni ja donis Vi.
Lumadu de l' libero flam'
en estontec' por ni!

Traduko de la Leceburga poemo "Ons Heemecht" de MICHEL LENTZ *(∗1820 – †1893) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

MR-366-1c / Arg-92-187 (2003-12-10 22:13:03)

[4]aŭ: odore floras la vitar'

[5]Alzeto (Uelzecht/Alzette), Zuro (Sauer/Sûre) kaj Mozelo (Musel/ Moselle) estas la plej grandaj riveroj en Luksemburgio.

[6]aŭ: Luksemburgion gardu tra